

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



60a jaro n° 2
marto - aprilo 1968


Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :
Dr. Pol Denoël Durwael Ivo Iserentant Roger

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO & PREZIDANTEJO
Debruyllaan 44, Wilrijk Tel. (03) 27425

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO
Kempeneers Paul Sielens Henri

ĜENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ
Debrouwere Gerard, Magdalenstraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

UNUA VICPREZIDANTO
Roose Fernand

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

ĜENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTINO Terryn Juliette, Raapstraat 72 Gent - Tel. (09)255381

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 RAAPSTRAAT 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2
P.K. 9051 25

U E A JUBILEAS

Okaze de la 60 jara ekzisto de nia internacia organizo, ni intencas publikigi serion de artikoloj. Ni komencas per historia artikolo el la bela libro de Prof. F. Privat "Historio de Esperanto" kaj kiu pitraktas la ekeston.

LA FONDO DE U E A (iom mallongigita)

La plej grava rezulto pozitiva de la "Delegacia" krizo estis sendube la fondo de la Universala Esperanto-Asocio (Temas pri la Idoskismo. N. de la Redakcio) en printempo 1908. Dum la Ĝeneva kongreso sinjoro Carles proponis la kreon de l'esperantistaj konsuloj en ĉiuj urboj. Poste alia Franca esperantisto, sinjoro Rosseau, licea profesoro en Bourg, proponis la fondon de esperanto-oficejoj, t.e. elekto de iu butiko aŭ magazeno, kie la esperantistoj povus ricevi korespondadon, meti afiŝojn, montri adresojn de la konsuloj kaj eĉ de tradukistoj por komercaj leteroj en Esperanto.

Hector Hodler.. kreis sian organon "Esperanto" en januaro 1907. En ĉiu numero duonmonata aperis en bona ordo adreslistoj de la novaj konsuloj kaj Esperanto-oficejoj kun tre interesaj ĉefartikoloj pri la utileco de la helplingvo por scienco, tekniko, turismo, komerco ktp. Baldaŭ la gazeto fariĝis la organo de la nove kreitaj fakaj societoj. Filo de la fama pentristo Ferdinand Hodler, li estis ankoraŭ 19 jara kaj ĵus finis la gimnazion, kaj li preferis vivi malriĉe ol forlasi la aferon.

Kiam eksplodis la krizo en novembro 1907, lin impresis konflikto pri kompetenteco inter Delegacio, Lingva Komitato, d-ro Zamenhof, kongreso ktp. kaj la ĝenerala dubo pri tio: kiu laŭleĝe reprezentas la uzantojn de Esperanto, ĉu la Lingva Komitato, elektita per akلامo en Boulogne, ĉu la kongresoj, ĉeestataj nur de tiuj kiuj povas vojaĝi tien?

Li tuj proponis organizi efektivan reprezentantaron de la esperantistoj kaj li dissendis kun Rousseau kaj kelkaj aliaj, cirkuleron al la grupoj proponante internacian organizon, kiu celus forigi nek la Lingvan Komitaton, nek la Centran Oficejon en Parizo, sed doni al ili regulan mandaton laŭ demokrata sistemo. En marto 1908 pli ol cent grupoj aliĝis al la ideo kaj elektis delegiton. En la dua cirkulero estis anoncote ke la projektita Internacia Organizo zorgos nur pri la necesa kuncentrigo de ĉiuj laboroj sur la kampo de l'uzado, antaŭ ĉio pri la definitiva starigo de l'konsuloj kaj oficejoj. Unuvorte ĝi reprezentos la uzantojn de Esperanto; ne por diskuti pri gramatiko, sed por utiligi la lingvon kaj ĝin riĉigi per sperto.


En aprilo 1908 okazis la voĉdono de la grupaj delegitoj por fondi la societeton kaj elekti la komitaton. De la 84 respondintaj delegitoj, 83 aprobis la statuton: "Sub la nomo Universala Esperanto-Asocio estis fondita asocio, kies celo estas la plifaciligado de la ĉiuspecaj rilatoj inter

diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj. "Art. 2a deklaris ke "la sola lingvo oficiala de la UEA estas la lingvo internacia Esperanto tia kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika verkaro". Per tiu esprimo la nova asocio konsideris esperanton kiel Poloj konsideras la Polan lingvon, Angloj la Anglan, do kiel iu popolo rigardas la sian.

En la komenco la delegitoj estis elektataj de la grupoj mem en ĉiu urbo. UEA iris trankvile sian vojon, donante sian tutan atenton al praktika organizo de siaj servoj informaj, helpaj kaj turistaj.

La tutan aferon de la "konsuloj" ĝi baldaŭ organizis en ĉiuj landoj per sia sistemo de delegitoj kaj per eldono de centra jarlibro kun adresaro laŭ alfabeto listo de urboj. La jarlibro de UEA fariĝis kun la 16-regula gramatiko la dua ŝlosilo por utiligi esperanton ie ajn.

Al la kvara kongreso en Dresden UEA aranĝis grandajn karavanojn el sudaj landoj. Dum la kongreso mem ĝi havis solenan kunsidon kaj D-ro Zamenhof akceptis honorprezidi la asocion: "Ne povas ekzisti la plej malgranda dubo pri tio" li diris "ke UEA estas la plej grava institucio de Esperantismo". En aŭgusto 1908, tri monatajn post la fondo, UEA havis 200 delegitojn, 80 vicdelegitojn, 100 subdelegitojn kaj 1300 pagintajn membrojn. La fondo de UEA savis la esperantistojn el teoriaĵoj. Antaŭe oni zorgis preskaŭ nur pri la propagando. Hodler kaj liaj amikoj organizis la uzadon kaj el tio multe gajnis la lingvo mem. La sistemo de "aprobantoj" nesciantaj Esperanton, aŭ de grupaj kunsidoj en nacia lingvo, ili malŝate rigardis kiel fuŝajn forlasindan. Leterojn en nacia lingvo ili resendis neleginte. Ili volis ke oni uzu la lingvon, ke oni lernu ĝin koni kaj ami per konstanta utiligo. Per tio ili donis al Esperanto popolon anstataŭ amikaron aŭ eĉ adeptaron. "Je kio utilas viaj kursoj?" demandis Hodler kaj Rousseau "Instruinte la gramatikon, vi devas instrui la uzon, la organizon de UEA-servoj, la manieron trovi adresojn, peti informojn". Tiuj junaj gvidantoj zorge diferencis inter esperantisto laŭ la Bulonja deklaro (= ĉiu kiu scias esperanton) kaj "esperantiano" (= ano de "Esperantio", la UEA-organizo). Tiuj ĉi lastaj sentu sin solidaraj, ĉiam pretaj servi kaj helpi al ceteraj, realigante en agoj la belan celon de la "Internacia Ideo".



50-a KONGRESO DE B.E.F.

BRUSELO

1, 2 & 3.6. 1968

pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO

Fino M.F. Bauwens, 14 Av. Charles-Quint
Keizer Karellaan 14
Ganshoren

50a JUBILEA BELGA KONGRESO

60-JARA JUBILEO DE BRUSELA GRUPO

Je alveno en Bruselo.

Dum la tuta mateno de sabato 1 junio, bruselaj esperantistoj bonvenigos la kongresanojn je alveno de la ĉefaj vagonaroj en la **Norda Stacidomo**. Esperantistaj fervojistoj deĵoros ĉe la ĝiĉeto "Informoj" en la halo de la sama stacidomo.

Je alveno en Bruselo, bonvolu tuj iri al via Hotelo, kiu situas apud la Norda Stacidomo (kun escepto de la Naturamika Domo, kiu situas apud la Suda Stacidomo). Tuj poste, ek de la 12-a h. bonvolu viziti la Kongresejon (Hotelo "des Colonies", 8 rue des Croisades/Kruisvaart, situanta apud Placo Rogier, je kelkcentoj de metroj de la Norda Stacidomo) por ricevi la kongresdokumentojn, la biletojn por ekskurso kaj bankedo kaj la insignon).

Arta Vespero.

S-ino Jana Ravselj-Flego de la Internacia Arta Teatro, ĉefpersono de la Esperanto-Filmo "Angoroj", akceptis ludi dum la Kongreso. Ŝi prizentos, inter alie, la monologon de J. Cocteau "La Mensogulo". La konata soprano Alice Van Wallegem, kantistino de la belga radio, prezentos en Esperanto rumanan, grekan, italan, flandran, hispanan kaj skotan melodiojn.

Gazetara Konferenco.

La Kongresa Komitato organizos gazetaran konferencon pri Esperanto en la Journalisma Domo de Bruselo, la tagon antaŭ la malfermo de la Kongreso.

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - CABARDINEN - LODENS
STIJLVOL HAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Speciala Poŝta Stampo.

La Poŝta Administracio konsentis disponigi specialan poŝtan stampo kun teksto en Esperanto.

Speciala ĝiĉeto funkcios en la Kongresejo sabaton la 1-an de junio inter la 13,30 h. kaj la 17,30 h.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken


Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 37.88.20



Ensendojn por la
majo - junio
numero ni petas
antaŭ la 15.6.1968



60-JARA EKZISTADO

DE LA GRUPO DE VERVIERS

Trilanda Renkontiĝo

Nacia Kunveno de BEJA

La semajnfino de la 20-21 aprilo 1968 povas esti enskribita en la ora libro de la Verviersa Esperanto-grupo. Pli ol 100 gepartoprenantoj inter kiuj pli ol la duono estis gejunuloj.

La akcepto okazis sabato-posttagmeze en la granda atendejo de la ateneo, kaj intertempe BEJA (Belga Esperantista Junulara Asocio) kunvenis por elekti novan estraron. Post preparoladoj, eĉ dum la posta tago, la nova estraro konsistas el jenaj fervoruloj:

Prezidantino: F-ino A. Geelen (Antverpeno)

Ĝen. Sekretario: S-ro R. Van Humbeeck (Antverpeno)

Sekretariino por la nederlandlingva parto: F-ino M. Vermeulen (Sint-Kruis-Brugge).

Sekretario por la franclingva parto: S-ro A. Jacobs

Kasistino: F-ino Y. Poupeye

Post la vespermanĝo gepartoprenantoj kolektiĝis en la festsalono kie okazis festvespero kun varia enhavo, preskaŭ entute kunmetita de teatraĵetoj kaj koreografio prezentita de la junularo, sub gvidado de S-ino Smeets, por la ateneo de Eupen, de S-ro Vanbreuse kaj A. Jacobs por la ateneo de Verviers; de S-ro Maertens G. kaj Paul Marechal por la grupo de Brugge (Sint-Kruis). Aparte menciinda estis la prezentado de judaj folkloraj dancoj fare de simpatiantoj.

Dimanĉe multaj ĉeestis la S. Meson, tute en Esperanto sub gvidado de Pastro Müller, kiu ankaŭ faris la predikon en la internacia lingvo.

Dum la oficiala kunsido en la ateneo, la Prezidanto de la grupo S-ro Herion raportis pri la historio de la movado en Verviers. El tiu raporto ni ĉerpas la jenan:

„Dum 1908 kelkaj izolaj esperantistoj fondis la grupon, kies celo estis antaŭenpuŝi la ideon kaj la disvastigon de la internacia lingvo:

„Sroj Parotte, Pirnay, Stembert, Gierkens kaj F-ino Assenmacker. Dum decembro 1921, kiam la membraro jam estis multe pli multnombra, la lernejoj instancoj de la urbo permesis al ni malfermi nedevigan kurson ĉe la gelernantoj de la 4-a grado en la komunumaj lernejoj: 60 infanoj 12 - 14 jaraj enskribiĝis post kelkaj varbaj vortoj de S-ro Longtain, ĉefdirektoro de la lernejoj. J. Parotte kaj J. Herion estis la bonvolemaj instruantoj.

„La sekvantan jaron, laŭ propono de S-ro L. Pirard, skabeno por instruado, la urba konsilantaro konsentis monsubvencion de 500 F por pagi la instruanton. En la jaro 1926, sekve al peto de pluraj lernintoj, ni kreis perfektigan kurson, kaj la urba monsubvencio pligraviĝis je 50 %, poste duobliĝis en 1930 ĝis 1934, kiam la administracio, pro diversaj cirkonstancoj, nuligis ĝin.

„ni devis do ĉesigi la kursojn ĉe la publikaj lernejoj. Dum longa periodo multaj publikaj senpagaj kursoj okazis en diversaj ejoj: ĉe la Popola Universitato, ĉe la Ateneo, ĉe la centra kaj la orienta lernejo.

"La grupo okazigis ankaŭ diversajn propagandajn kunvenojn dum kiu i.a. prelegis : Sro Jennen (Bruselo) Sro Advokato Jongen (Lieĝo) Sro Francis Guin, konsulo de Chili en Verviers, Sro Fr. Schoofs (Antverpeno) Prof. Cart, Prezidinto de la Akademio, Sro Dro Denoël (Lieĝo) Sro A. Dohogne, urbestro de Cornesse kaj Prof. Vanbreuse.

"Jam tuj post la starigo de la grupo en 1908, la unua Belga Esperanto-kongreso okazis en Verviers en 1909 sub prezidanteco de Sro Witteryck. Dum 1925 la grupo organizis la 14-an kongreson.

"Sekvis periodo kun malmultaj okazintaĵoj.

"Diversaj klopodoj por revivigo iom malsuksecis, sed en 1956, post parolado de Dro Denoël, Prof. Vanbreuse eklernis la lingvon kaj starigis tuj serion de elementaj kursoj el kiu nun elkreskis la junulara grupo, kun plena autonomio kiu jam plurfoje montris sian agemon kaj vigecon. Sialflanke, niaj membroj F-ino Smeets kaj Sino Vertongen instruas Esperanton al grupeto de ĝenernantoj en Eupen...

Post tiu raporto la diversaj grupoj de Belgujo honorigis la Esperanto-klubon de Verviers per honorigaj vortoj kaj donacoj transdonitaj al ges. Herion.

La ĝenerala prezidanto, Sro Jaumotte M. fermis la kunsidon per personaj gratuloj kaj speciale altiris la atenton al la junaj elementoj kiuj nun en Verviers ekaĝas.

Tiam ĉiuj forlasis la salonon de la ateneo por iri grupe al la urbdomo, kie ili estis akceptitaj kaj regalitaj de la du skabenoj, la komunuma sekretario kaj kelkaj urbaj konsilantoj.

Tagmeze la gepartoprenantaro tagmanĝis en Spa, kaj faris poste ekskurson en la nord-ardena regiono.

M. G.

ESPERANTO-UNUIĜO DE GERMANAJ INSTRUISTOJ

Helmut Sonnabend

3161 Dollbergen

Im Eckerkampsfeld 11 a Germanujo

La konata Internacia Domo Sonnenberg en la Harzmontaro sude de Hannover kaj la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) kore invitas vin al pedagogia kongreso, en kiu oni la unuan fojon en tiu domo uzos la Internacian Lingvon. Tio devus esti por ni ĉiuj instigo viziti la konferencon, okazontan de la 20 a ĝis la 29a de septembro 1968. Ni devos pruvii, ke Esperanto estas serioza kaj taŭga komprenigilo por konferencoj internaciaj kaj pro tio lerneja fako.

Eminentaj esperantistoj kiel prof. d-ro Lapenna, d-ro Bormann, d-ro Sadler kaj la ĝenerala sekretario de UEA, s-ro Becker, jam nun promesis veni kaj paroli pri temo en la kadrotemo.

Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj.

Ni invitos eminentulojn de la registaro, sindikatanojn ktp. por konfronti ilin al la Internacia Lingvo.

Ni ankaŭ bezonas vian helpon. Pro organizaj kaŭzoj ni jam nun petas vian anoncon. La kostoj por la 10 taga restado nur estos 85.— DM.

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 Aŭgusto 1968

Loĝado.

La Loĝiga Servo de la Universala Kongreso komunikas ke en la kategorioj C, D kaj E ne plu estas je dispono unutilaj ĉambroj.

Por komplezi al la kongresanoj, kiuj ne povas pli frue sendi la mendilon por loĝado, la Loĝiga Servo sukcesis prokrasti la limdaton por akcepto de la mendiloj ĝis la 25-a de majo 1968. Post tiu ĉi dato ne plu eblas garantii rezervon de litoj.

Arta Festivalo.

En la kadro de la A.F. la Internacia Arta Teatro prezentos verkojn de Azevedo, Cankar, Cocteau, Krleza, Nušić kaj Pirandello. En 1968 I.A.T. festos la 10-jaran datrevenon de sia unua prezentado.

Post la sukcesoj en Sofio kaj Budapeŝt, Bulgara Esperanto-Teatro denove sin prezentos al la internacia esperantista publiko kun verdo de la bulgara aŭtoro Kostov.

"Coral Zaragoza", konata hispana kanthoro, prezentos hispanajn folklorajn kantojn en Esperanto.

I.S.U.

En la kadro de la Internacia Somera Universitato prelegos Prof. Bokarev, Amb. Harry, Prof. Lapenna, Muzik. Lesznaĵ, Prof. Peevski, Prof. Regulo Perez, D-ro Tonkin, Prof. Waringhien.

Kongresejo.

La Kongresejo, "Domo de la Sindikatoj", situas tute centre en Madrid, vidalvide al la granda muzeo "El Prado" kaj estas facile atingebla per subtera fervojo el ĉiuj partoj de la urbo.

Broŝuro de RENFE.

Kvardekpaĝa ilustrita broŝuro de la hispana fervojo, "Vojaĝi tra Hispanio estas facile", estas ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso kontraŭ pago de la sendkostoj (minimуме unu respondkupono)

Limdato.

Ni atentigas ke la limdato por aliĝo al la 53-a U.K. estas fiksita je la 25-a de junio 1968. Aliĝoj post tiu ĉi dato estos akceptitaj nur en esceptaj kazoj kaj kontraŭ ekstra pago de 25.— ned. gld.

3-a KARAVANO AL LA SUNO

Post ricevado de diversaj informoj, mi decidis ne fari la marbordan vojaĝon laŭ Malaga kaj Cadiz al Sevilla, sed veturi de Granada al Sevilla laŭ Cordoba. Tiel ni ŝparas multajn kilometrojn kaj povas resti tagon en Granada kaj tagon en Sevilla (ĉiam en unua-rangaj hoteloj kun bano en la ĉambro).

El nia lando tre malrapide envenas la enskriboj, dum ke tiuj el la eksterlando daŭre envenas. Internacio do garantiata.

Kaj, ĉu la nomoj de mirindaj urboj ne allogas : Carcassonne, Tarragona, Zaragoza, Madrid, Granada, Cordoba, Sevilla, Salamanca kaj Burgos ! Dum la kongresa semajno ni vizitos per propra aŭtoĉaro Avila, Segovia kaj Toledo. Ne plu hezitu nun : aliĝu kaj trovu ne nur belan vojaĝon sed Esperantujojn dekomence.

Maertens G. Pr. Leopoldstraat 51 Sint-Kruis.

Mi disponas ankoraŭ pri ĉambroj por la kongresa semajno en hotelo unuaklasa tre proksime de la kongresejo. Ne necesas esti karavanano !

ESPERANTO

Nova estraro de Belga Esperantista Junulara Asocio elektita dum la nacia kunveno en Verviers (20/21.4).

Prezidantino : F-ino A. Geelen (Antverpeno)

Ĝenerala sekretario : S-ro R. Van Humbeek, Dambruggestraat 26
Antwerpen

Sekretariino por la nederlandlingva teritorio : F-ino Maria Vermeulen
(Sint-Kruis)

Sekretario por la franclingva teritorio : A. Jacobs (Verviers)

Kasistino : F-ino Y. Poupeye (Bruĝo)

Programo Esperanto-Junulargrupo Sint-Kruis

Post la sukceso de niaj prezentadoj en Verviers, ni faris programon por la restanta parto de la lerneja jaro antaŭ la libertempo.

Dimanĉo 19.5.68 :

10-horo : leciono

11-a : rakontoj pere de diapositivoj fare de S-ro
Couwenbergh, apotekisto ;

Dimanĉo 26.5.68 :

je la 10-a horo ĝis la 11-a leciono por ĉiuj kiuj opinias
ke ili bezonas ankoraŭ iom da ekzercado.

Dimanĉo 2.6.68 :

Pentekosto : por tiuj kiuj povas ĉeesti, leciono ek de la
10-a kaj laborkunveno ek de la 11-a.

La sekvanta periodo - ekzamenoj ktp. - estos senkunvena, kaj la estraro komunikos la libertempajn aranĝojn fine de junio.

Rilate la vojaĝo al Madrid, jen la anoj kiuj partoprenos ĝis nun :
Decock Angèle - Lauwers Hilda en Walter - Maertens Dirk en Johan.


JUNULARO

Kial la junuloj estas mutaj dum la kunvenoj ?


En kunveno, mi aŭdis maljunajn esperantistojn parolante inter si. Lu diris : "Estas multaj gejunuloj sed ili ne parolas esperantlingve". Tio estas la vero. Sed vi, vi kiu kritikis la gejunulojn, ĉu vi helpas ilin ? Mi estas esperantisto depost du jaroj, kaj mi rimarkas, kaj ankaŭ miaj geamikoj, ke dum la kunvenoj, estas du apartaj grupoj : la malnovaj, spertaj esperantistoj kaj la junaj novaj esperantistoj. Ni, kiuj estas ĝenerale timemaj (ĉu vi rememoras kiam vi mem estis komencanto ?...), bedaŭris tion. Vi devas kompreni ke se la junuloj restas solaj, ili preferas paroli franclingve. Kaj se ili krokodilas, Esperanto ne plu progresas. Tial, mi kaj miaj geamikoj, sincere esperas ke en la proksimaj kunvenoj, vi, la spertaj esperantistoj, venos paroli kun ni, la junaj esperantistoj. Sed vi devas pacienci kiam ni bezonas trifoje la necesan tempon por esprimi nian ideon. Tiel ni kutimigas paroli esperanton kaj ni povos progresigi nian lingvon. Antaŭe ni dankas vin. H. Vanderhaegen

EL ESPERANTISTA AMIKECO (VERVIERS)

OPTIKA TROMPO



Ĉu ankaŭ ni konas tiajn fenomenojn ? Sendu ilin al la redakcio.



Prof. G. Waringhien : "Aktoj de la Akademio (1963-67)" 75 P.
Prezo : 9 Ned. Guld. aŭ 22 steloj.

Ne malmultaj esperantistoj demandas al si kion faras la Akademio. Jen estas la respondo. Unue troviĝas mallonga historio de la lingvaj institucioj. Sekvas la statuto de la akademio. Poste nomaro kaj adresaro de la membroj. La lingva parto konsistas el du aktivaj : la enketo kaj decidoj pri la pasivaj partecipoj ; kaj tiu pri la vortfarado en Esperanto. La dua estas, laŭ mi, pli interesa ; sed la unua estas pli pasiplena. Rilate la unuan, ni ripetas nian vidpunkton : ni ne dubas ke la itismo estas konforma al la fundamenta ekzercaro, do al la fundamento. Sed : a) ni kredas ke Jung montris ke Zamenhof mem ne ĉiam estis konsekvenca (tio estas ne grava afero) ; b) kion fari se per iuj uzoj de estis -ita, oni staras antaŭ absurdaj (kiel la sama Jung montris) ? c) kiamaniere faciligi la instruadon de la konjugacio (iĝas vere malfacile por ĝuste scii kiam oni uzu estis -ita, aŭ estis -ata) ? La konsiloj sur p. 41-42 ne solvas ĉiujn kazojn.

Konklude : tre interesa dokumento por ĉiuj kiuj interesiĝas pri la lingvistiko de Esperanto. Bedaŭrinde ke la prezo estas iom alta.

"Sennacieca Revuo" Num. 96. Jaro 1968. Eldonis S.A.T. Avenuo Gambetta 67 en D Paris 20. 57 p. Prezo : 4,5 Fr. ; 3,30 Ned. Guld. ; 0,9 Us. Dol.

Ni trovas en tiu-ĉi kajero la artikolserion de Ulrich Lins, aperintan en "Germana Esperanto-Revuo" kiu pritraktas la historion de Esp. sub la tria regno de Hitler. Nur la Germana parto estas iom plimallongigita. Ni konstatas kun plezuro ke la agado de Flandra Ligo kaj de ĝia Bruĝa sekcio "Paco kaj Justeco" estas menciita. Interese estas konstati kiel politiko influas aliajn movadojn kaj kiel tiuj movadoj klopodas adaptiĝi al la cirkonstancoj ; ofte por savi kio estas savebla. Ekzemplo el nia lando : antaŭ la milito estis tie-ĉi klopodoj por starigi Grand-Nederlandan Esperanto-Movadon.

Dro Neergaard skribis kontribuon pri Hindujo, Simon Aarse pri la nuna Nederlando en la kapitalismo kaj Cosette Giroud pri Alĝerio. A. Caubel skribis rimarkindaĵojn pri la abelcivito. Sekvas kompreneble la jam kutima "Laŭ mia.. ridpunkto" de R. Schwartz. Enestas kelkaj poemoj kaj multaj ilustraĵoj. Oni multe lernas per la legado kaj samtempe oni multe ĝuas. Cetere ni ne dubas pri la sukceso de tiuj jam tradiciaj jaraj kajeroj.

"Scio estas Forto", kie la aŭtoro faras demandon al la leganto, ni ŝatus rebati la demandon al li mem. Ni faras tion per bonaj argumentoj : ĉe vera artisto la romanpersonoj vivas en lia animo ; eĉ tiamaniere ke la aŭtoro ne arbitre diktas al ili la konduton, sed tiel ke tiu konduto sekvas el la ecoj de la personoj. J. H.R., rakontu plu ; Kia estis la verdikto ? Kiel evoluis la interna psika konflikto ? Kaj kion li dicitis ? Aŭ ĉu la "mi" persono estas vere la aŭtoro mem ? Ni forte rekomendas la libron.. kaj atentigas pri la malalta prezo.

Johan Hammond Rosbach : "La Mirinda Eliksiro". Rakontaro eldonita de Dansk Esperanto-Forlag ĉe L. Friis en Aabyhoj. 99 p. Prezo : 10 Dan. Kr.

Jen vere libro por ĝui. Malofte ni legis esperantolibron kiu estas tiel agrabla kaj malstreĉiga. Prozo facila kaj tamen bela. Do, escepte, jen libro ankaŭ por tiuj kiuj ne jam tute perfektigis en Esperanto. Preskaŭ ĉiuj rakontoj havas tre surprizajn intrigojn. Kelkaj estas meditigaj kiel ekz. "La Feliĉo". Cetere la libro havas kiel moton la sentencon de la Romia imperiestro M.A. Antoninus "Neniu estas feliĉa, kiu ne konsideras sin mem feliĉa". Je la fino de la rakonto

ELDONO DE PLENA ILUSTRITA VORTARO.

Pri tiu eldono ni jam atentigis en nia numero de dec. '67. Ni nun povas doni plian komunikon. La prezo estos multe pli malalta ; ĉirkaŭ 19 Us. Dol.

Sed necesaske 2000 enskribantoj promesas aĉeton antaŭe. Oni povas anonci sin ĉe S.A.T. Avenuo Gambetta 67, Paris 20 aŭ ĉe nia vendoinstituto.

HUNGARA ELDONO

Hungara Esperanto-Asocio kaj Libroeldonejo CORVINA intencas eldoni la Eliktitajn Poemojn de Sandor Petőfi, la plej eminenta lirika poeto de Hungarujo. La tradukon faris Kalman Kalocsay, la majstro de poezio kaj artradukado. La libro similas al "La Tragedio de l'homo" laŭ eksteraj kaj laŭ amplekso. La prezo estos proksimume 2. - USA D. Vi povas jam antaŭmendi ĉe nia instituto.

BIBLIA REVUO

BIBLIA REVUO, post kvar jaroj de kiam aperis fare de Prof-ro D. Broadribb el la Universitato de Melbourne, ekde la venonta januaro, reaperos renovigita kaj pligrandigita fare de Italia Biblia Societo.

BIBLIA REVUO sin turnas al kiuj interesiĝas pri bibliaj kaj orientaj temoj.

BIBLIA REVUO aperos dumonate per ĉ. 64 paĝaj kajeroj. Jarabono kostas por Italujo 3.000 lirojn kaj eksterlande 6 usonajn dolarojn aŭ egalvaloran nacian monon.

La unua kajero de la nova serio enhavos i.a. artikolojn de D. Broadribb : Proto Luko ; A. Capell : lingvo kaj religio laŭ la biblia vidpunkto ; G. Rust : kiu verkis la kvaran evangelion ?

Kiu havas eblecon kunlabori per artikoloj, novaĵoj k.t.p. estas ege petata sin turni al la Direkcio aŭ Redakcio de B.R.

Kiu deziras ricevi la unuan kejeron de B.R. bv. peti al : "Biblia Revuo., Piazza Duomo 4 48100 Ravenna (Italujo).

Victor Sadler: "Memkritiko". Poemaro eldonita de Koko, Danujo en la jaro 1967. Bindita. 60 paĝoj; prezo: 10,50 Dan. Kronoj.

Kvankam mi legis kelkajn poeziaĵojn kiel ekz. nr. 96 sur p. 9 kaj nr. 29 sur p. 18, mi devas diri ke ĝenerale ne estas io poezieca en tiu libro de poezio. Tamen mi jam legis kelkajn laŭdajn kritikaĵojn. Mi demandas al tiuj recenzintoj sur kio baziĝas tiu laŭdo. Sed, se ni pripensas kiamaniere estiĝas laŭda kritiko - tiel sur la kampo de literaturo kiel sur tiu de la pentroarto - tiam ni scias kion (mal) valoras tiuj laŭdoj. Ni, kontraŭe, kiuj estas neniel la interesatoj, ni konsideras kiel nian devon laŭdi nur se laŭdo estas objektivite pravigebla. Esperantistoj ne estu viktimoj de kia ajn antaŭjuĝo, prefero, ĉantaĝo. Por ni, io estas poezio kiam ĝi esprimas penson aŭ senton, aŭ kreas imagan bildon. La cetero havas la artan valoron de nefigura pentroarto, t.e. de kompleta subjektivismo; tiel ke absolute ĉiu rajtas diri kun egala pravigebleco ke li produktas artaĵon. Finfine ĉu jes aŭ ne oni ankoraŭ postulu normojn sur la tereno de arto? Kaj se jes, kiujn?

Ne nur V.S. ne metis sian nomon kiel aŭtoron, sed eĉ li ne donis pseŭdonomon. En la antaŭparolo li diras ke li "trovis faskon da manuskripto". Unu meriton ni devas aljuĝi al V.S., tiun de humoristo (eble de duba senco). Efektive en la sama antaŭparolo li diras: kio plej frapas pri la manuskripto estas ilia ĝenerala negraveco, la malklareco de la enhavo kaj la nur sporade konstatabla verstekniko; kaj iom sube sur la sama paĝo 5: "Poemaron kun la nomitaj kvalitoj oni evidente devis publikigi senprokraste". Sur la titolpaĝo troviĝas diro de Maŭ Zedong (tute laŭmoda): Ni devas deteni nin de memkontentemo. Mi ne scias ĉu tie-ĉi necesas plia komentario? Mi nun ne volas konkludi ke tiu poemaro plaĉos al neniu. Tute ne. Kiel stomakaj gustoj ekstreme malsimilas ĉe la tuta homaro, tiel ankaŭ la gustoj je spiritaj nutraĵoj. Al tiuj kiuj frandos la sennoman "Memkritiko"n, bonan apetiton, kaj bonan (spiritan) digeston.


Tibor Sekelj, Lic.: "Mondmapo". Formato 98 x 69. Eldonis la Internacia Instituto por oficialigo de Esperanto - I.O.E. en Beĝrado 1968.

Esperantistoj kiuj havas infanojn-lernantojn, pripensu la aĉeton de tiu mapo. La grandeco estas ideala por pendigi al la muro de studoĉambro. La nomoj estas klare presitaj; dezertoj kaj reliefo montritaj. Diversaj kompetentuloj kunlaboris. Sube estas pli malgranda Eŭropa mapo. Esperantistoj lernos la geografiajn nomojn; kiuj ja ĝuste konas ilin?

Todor Jivkov: "Naŭa Kongreso de la Bulgara Komunista Partio" Nov. 1967. Eldono de Fremdlingva Literaturo en Sofia, Str. Levski Nr. 1

Riĉa dokumento por tiuj kiuj interesiĝas pri- kaj studas la politikan evoluon. Finas la libron parolado de la raportinto, parolado ofte interrompita de aplaŭdoj tiaj estas superitaj nur de la aplaŭdoj al Maŭ Zedong en Ĉinio.

Internaciaj Seminarioj de la Germana Esperanto-Junularo Volumo 1: "La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj". Eldonejo Ludwig Pickel,



Postfach 2113 en Nürnberg D - 85. Jaro 1967. Prezo: 9,60 Germ. M.; 32 st.

Jam famaj estas la ĉiujaraj seminarioj de la Esperanto-Junularo en Germanujo. La aktualaj plej gravaj vivtemoj estas tie pritraktataj. Nun tiu organizo efektive estas la eldonon de la interesaj prelegoj. Ĝi komencas per la serio de la semajno de 27-12-'66 ĝis 3-1-'67. Tio iĝis ampleksa libro de 165 densaj paĝoj. Sekvas kvar paĝoj kun fotoj kaj mallonga "curriculum vitae" de la kontribuintoj. Enestas ankaŭ la interesa kaj klara pritraktado de nia ligano Wim De Smet: "Nunaj Mondperceptoj per la Biologio". Kutime partoprenas ankaŭ Prof. Lapenna, ĉifoje per: "Internaci-juraj problemoj de la spacveturado". Plie ni trovas Klaus Wandelt: "Cibernetiko"; Dr. A. Albault: "Superpopolado, konsekvenco de kronika malsato"; Bozidar Popović: "Rigardo en la Mikro- kaj Makrokosmon". Kaj multaj aliaj. Ĉiujfoje specialisto en iu fako klerigas aliajn intelektulojn. Por la esperantista kulturo estas dezirinde kaj eĉ necese ke oni eldonu ĉiujn seriojn. Ni atendas la aliajn; i.a. tiun pri religioj kaj filozofio. Sed tio devas esti finance ebla. Do se vi, interesiĝantaj legantoj, aĉetos grandnombre tiun-ĉi eldonon, baldaŭ povos sekvi alia.

Hungaraj Turismaj broŝuroj.

Sekve de la klopodoj de Budapeŝta samideano, S-ro L. Somlai, pluraj turismaj centroj eldonas nun en Esperanto propagandajn broŝurojn, tre belajn. Nia samideano devas mem ilin traduki. Ili estas senpage haveblaj. Espereble envenos multaj mendoj. Jen kelkaj: pri Esztergom, 4 paĝoj, Fremdultrafika oficejo, Szechenyi ter 13. Faldfolio kun gvidilo pri la regiono de Miskolo.

Adreso: Fremdultrafika Oficejo, Szechenyi u. 56. Pri la regiono de rivero Tisza, 20 paĝoj; Fremdultrafika Oficejo, Kossuth placo, Szolnok. Pri la regiono Paloc, 24 paĝoj; Fremdultrafika Oficejo de Konsilantaro de Departemento Nograd. Ĉiuj estas riĉe ilustritaj. Gratulojn al S-ro Somlai.

La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (S-ro Iserentant R.)
Kerklaan 61 BRUĜO, Poŝtĉekkonto 152140

Korespondadreso

Jan HORNIK Bedrichov, Posumavska 9; p. JIHLAVA Ĝeĥo-Slovakujo deziras interŝangi poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn.

Witold Konorewski CZESTOCHOWA Ul. Warszawska 46 m. 11 Pollando.

25 jara teknikisto: Interesiĝas pri foto, turismo, filmo, teatro kaj sporto: volas interŝangi bildkartojn, poŝtmarkojn kaj gramofondiskojn.

Paulo Cesar do Couto Cabral

Rua Casimiro de Abreu, 27 - Inga

Niterói - Est. do Rio - Brasil.

Mi komencas nun kolekti poŝtmarkojn kaj mi ŝatos recipi de vi iujn de via lando.

Mi deziras koni la korektan nomon de via lando kaj de la mia en via nacia lingvo. Mi dankas vin.

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"
Kunsidoj : Ciuvendrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15
Antwerpen je la 20.15a horo.
Poŝtĉeknumero : 726.54.

GRUPA VIVADO

La 9an de februaro 30 Verdstelanoj ĉeestis pulĉinelan prezentadon en la Poppenschouwburg "Van Campen" kaj ĝuis mirindan teatraĵon: Marionetoj, kiuj karakterizas tipe antverpenajn personojn el la popolkvartalo.

La 16 an S-ro R. Jacobs, Prez. de la Brusela Grupo, paroladis pri "Itala libertempo 1967: Romo, Amalfi, Pompei". Agrabla vojaĝo tiel por la ĉeestantoj kiel por la paroladisto ĉar li surbendigis la parolitan tekston kaj kompletigis ĝin per muziko, foje emociiga, foje vivplena. La tuto substrekiis belegan serion da kolorigitaj diapozitivaj en kiuj la paroladisto metis la sferon de la regiono, de la libertempo sed precipe la riĉan belecon de la naturo.

La 23an S-ro F. Herman prizorgis kulturalan kvizon kun lumbildoj kies titolo "Kiu estas tiu" estis plensignifa. Li kunlaborigis la ĉeestantojn montrante al ili serion da bildoj pri personoj kiuj - en la mondo kaj je iu momento - staris en la publika interesiĝo. Post nervstreĉa konkurso S-ino Clara Durwael, la edzino de la Vicprezidanto, brile gajnis la premion.

La 1an de marto S-ro I. Durwael, la Vicprezidanto, enkondukis kaj gvidis debatvesperon pri "La Homo kaj la Aŭtomatigado": aktuala problemo. Sekvence multaj donis sian opinion. La konkludo estis: kiel ĉiuj aferoj ankaŭ la aŭtomatigado ne estas nur bona. Ĝi certe enhavas en si malbonajn flankojn. Tamen ĝi estis logika sekvo de la homa pensado. Oni nek kapablas nek devas ĝin bremsi, sed oni serĉu rimedojn por ke ĝi kiel eble plej multe utilu por la homaro.

La 8an diplomdisdono al la gelerinintoj de la lasta elementa kurso donis la eblecon al la Prez., S-ro Jaumotte, gratuli la laŭreatojn kaj transdoni al ili la diplomon + libron, verkitan de S-ro H. Sielens, "La Historio de La Verda Stelo". La gediplomitoj estas: S-inoj Van Daele kaj Renders, F-ino Vernimmen, S-roj Nulens kaj Renders. Nome de la gelerinintoj

S-ino Renders dankis la profesoron, S-ron H. de Roover, per tre afablaj vortoj eĉ en formo de poeziaĵo. S-ino Van Daele transdonis belegajn florojn kune kun donaco al la profesoro. Emociplene S-ro de Roover dankis.

Dum la dua parto de la kunveno muzika programo, organizita de S-ro A. Faes, pri "La Printempo venonta", entuziasmigis la aŭdantaron. Diversaj muzikaj kiel pianokonzerto de Mozart, Variations symphoniques de César Frank kaj Simfonio de Ernst Schosson, donis al la sentplena paroladisto la eblecon komenti kaj priparoli la aŭtoron aŭ la enhavon de la muziko laŭ jen melankolia, jen laŭ arta maniero.

La 15an S-ro R. Van Eynde rakontis pri sia restado en Berlino dum la pasinta somero. Ĉar S-ro Van Eynde ankaŭ vizitis Berlinon antaŭ la milito, li povis fari rimarkindajn komparaĵojn; ankaŭ pri la "fama muro" li donis plurajn detalojn. Tuta serio da lumbildoj bonege substrekiis la raporton de la paroladisto.

La 22an F-ino A. Enzlin per filmo, de ŝi verkita, kaj per pluraj dekoj da diapozitivaj en belaj koloroj, raportis pri la lasta, famkonata universala ekspozicio de Montreal en Kanado. Ŝi faris la vojaĝon aviadile kaj dum kelkaj semajnoj vagadis en la ege interesa mondo de la ekspozicio. Ŝi detale raportis pri la pavilonoj de la multaj landoj sed precipe, kaj kompreneble, pri tiu de Belĝio.

La 29an S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn. Unu inter ili "Mozaikoj" estis Esperante parolata de S-ro P. Peeraerts laŭ tre facila maniero. Tiu sama samideano ankaŭ tradukis la tekston el la franca. S-roj R. Van Eynde kaj J. Montmirail respondecis pri la teknika flanko de la tuto.

FAMILIA VIVO :

Nekrologo : Kun emocio ni eksciis la morton de S-ino Bertha Jacobs, la afabla edzino de S-ro Jan Jacobs. La edzo estas pioniro de la movado

jam de antaŭ la I-a mondmilito kaj membro de La Verda Stelo dum longaj jaroj kune kun la edzino. Pasintan jaron ili festis sian jubileon de 55-jara geedziĝo. Ili konatiĝis en Esperantujo antaŭ 58 jaroj. Al nia kara membro, S-ro Jan Jacobs, kaj familio ni prezentas niajn profundajn kunsentojn en la funebro kiu trafas ilin.

Sukcesinta lerneja parolado : En la kadro de siaj studoj F-ino Marit Montmirail, denaska membrino de La Verda Stelo kaj filino de nia kunlaboranto S-ro J. Montmirail, faris paroladon pri Esperanto en sia klaso, St Tereziainstituto de Berchem / Antverpeno. Samtempe okazis ekspozicio kaj surbendigita intervjuo kun Prezidanto M. Jaumotte. La efiko estis tiom granda ke la profesoro proponis organizi Esp-kurson en la lernejo por la tuta klaso. La komitato de La Verda Stelo nun pristudas tiun problemon.

Ciukaze ni elkore gratulas F-inon Marit Montmirail pro la iniciato kaj pro tiom da sukceso !

Ni havis ankaŭ specialan muzikan vesperon. La 14an de marto - la naskiĝtago de nia prezidanto - ni havis la kunvenon en lia hejmo. Iom bona mangajo kaj trinkajo pligajigis la tre interesan cerbogimnastikon de festdirektoro A. Dumarey.

Granda parto de nia aktiveco nun konsistas el helpo diversspeca al la junulara grupo per ekz. konferencoj, gvidado de kurso, organizado de ekskursoj (specialaĵo de S-ro Maertens). Ni planas - kiel ni taris pasintjare - tutagan restadon en junulara hejmo por prirakti, sub direktado de S-ino Roose-De Kersgieter, la temon: la virino en la nuna mondo.

Fine, ni ne forgesu la ĉiumonatajn estrarkunvenojn ĉe F-ino S. De Koninck en sia tre hejmeca domo, kie la materia homo estas tiel bone prizorgata kiel la spirita homo.

GRATULOJN al Gesinjoroj Roger Iserentant-Blanche Schepens kiuj la 15 an de majo estas dum 25 jaroj geedzoj.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92 Entrepreno de
KONSTRUAJOJ

"Paco kaj Justeco" Brugge

Ekster la kutimaj aktivajoj ni havis jenajn iom eksterordinarajn kunvenojn.

Por la dua fojo la ministerio de publika instruado prezentis TV elsendon pri la kulturaj centroj. Ni rigardis ĝin; en speciala kunveno pridiskutis ĝin kaj sendis denove raporton al la ministerio.

Pro la fakto ke ni havas en niaj vicoj kelkajn amatoregojn de dia'oj kiuj estas teknike perfektaj, ni invitis sinjoron Bert Verlinde por montri la siajn al la grupo. Li estas unu de la specialistoj en la lando pri faŭno kaj floraro.

Post la Verviersa Jubileo

Dankvortoj de la prezidanto.

Karaj Gesamideanoj en la tuta lando:

Ĉe la fino de la jubilea ceremonio, premita de la emocia momento kaj de la fatala urĝeco por ĝustatempa alveno ĉe la urbdomo, ni eble ne sufiĉe esprimis la dankesentojn kiuj regis nin vid-al-vide de la amikaj manifestadoj de vi ĉiuj rilate nian grupon kaj ĝian komitaton. Kredu vi ke la belaj kaj valoraj libroj donacitaj trovos adekvatan lokon en la grupa biblioteko, pliriĉigante ĝin, kaj demonstros al niaj posteuloj la varmkorecon de la belga samideano. Siaflanke, la florumitaj sinjorinoj provos konservi plej eble longe la vivantan ates-taĵon de via kora amikeco, de kiu ili jam antaŭe recevis plurfoje nepran pruvon.

Koran, tre koran dankon al vi ĉiuj: kaj ek al pluj taskoj.

Jos. Héron

**REGA ESPERANTISTA
BRUSELA GRUPO**

Kunsidoj ĉiulunde, je la 20a h., en
nia nova kunvenejo:

Hotelo "EXELSIOR", elektu inter je-
naj tri enirejoj:

- 1e "Hôtel des Colonies",
8, rue des Croisades.
- 2e "Hôtel Exelsior",
7, rue du Progrès.
- 3e "Les Mousquetaires",
11, rue du Progrès.

MAJO 1968

- 06an: Parolata jurnalo (serioj A kaj
B).
- 13an: Parolado de S-ro CASTEL:
"La bestoj kaj ni".
- 20an: Perfektiga Kurso, fare de S-ro
van der STEMPEL.
- 27an: Parolado (kun ekrano kaj tabu-
lo) de S-ro VAN EYNDE:
"Aspektoj pri ekonomio en
Belgujo".

JUNIO 1968

1an, 2an kaj 3an:

50a JUBILEA BELGA KONGRESO

60-jara JUBILEO DE BRUSELA GRUPO

10an: Konsideroj pri la 50a Belga
Kongreso.

17an: Perfektiga Kurso, fare de S-ro
van der STEMPEL.

24an: Parolado (kun diapozitivoj kaj
muziko) de S-ro LERNOUT:
"Spirito de la Renesanco".

Dum nia **JUBILEA JARO** ni speciale
alvokas al novaj mebr(in)oj; ĉiuj ni
kapablas membrigi familianon aŭ
amik(in)on. BONVOLU!

la Sekretariino,

Marie-France BAUWENS

la Prezidanto,
René JACOBS

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Transpreno	122.541 F
S-ro de Roover H. (Antverpeno)	600 F

123.141 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

DU INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ EN DANLANDO

1) Helsingor 21 ĝis 28 julio.

Tiu kurso funkcias jam pli ol 30 jaroj. Ĝi okazas en la urbo apud kiu staras la kastelo "Kronborg" de la fama Hamletttragedio. Ĝi estas ankaŭ tute proksima de bela banstrando. Oni ekskursos ankaŭ al Helsingborg laŭ la alia flanko de la Sund, en Svedujo. La diversaj kursoj okazas nur antaŭtagmeze. Kostoj por ĉio: 2 persona ĉambro: 365 Dan. Kr. kaj 1 persona ĉambro: 420 Dan. Kr.

2) Aarhus 13 ĝis 19 okt. '68.

Sama kurso sed en alia loko. Samaj aranĝoj: kurso matene; kaj ekskursoj posttagmeze. Vespere diversaj amuziĝoj. Kostoj por kurso, restado, ekskursoj, manĝoj: 2 persona ĉambro: 350 kaj por 1 persona ĉambro: 390 Dan. Kr. Por banĉambro oni pagas 30 Kr. pli. Adreso: L. Friis, Ingemansvej, Aarhus, Danujo.

ALVOKO

VI BEZONAS UEA, ĉar, en via intereso, Universala Esperanto-Asocio KOMPETENTE reprezentas la interesojn de la Internacia Lingvo ĉe internaciaj instancoj; pere de CED prizorgas dokumentadon pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemo; organizas la mondan informadon pri la Internacia Lingvo kaj disvastigas la lingvon en ĉiuj mondopartoj; aranĝas altnivelajn kongresojn, konferencojn kaj seminariojn; kuraĝigas la artan kreadon kaj evoluigon de la lingvo per Belartaj Konkursoj, Artaj Festivaloj, Internacia Somera Universitato, serio Oriento-Okcidento; eldonas tri revuojn, ampleksan Jarlibron kun amaso da fidindaj informoj kaj aliajn publikajojn; prezentas la maksimumon de ĉiaspecaj praktikaj servoj, precipe pere de la delegita reto, unika en la mondo....

UEA BEZONAS VIN por povi pli sukcese plenumi siajn taskojn kaj por doni al vi ankoraŭ pli da praktikaj servoj.

ALIĜU JAM HONDIAŬ KIEL INDIVIDUA MEMBRO DE UEA

KOZITOU

Membro kun jarlibro	170 fr.
Membro - abonanto	340 fr.
Membro - subtenanto	510 fr.
Juna membro (jarlibro)	85 fr.
Juna membro - abonanto	225 fr.
(malpli ol 22 jara)	

Pagoj al Fr. Schellekens, Fr. Hensstr. 44 c-10-3
Antwerpen (P. K. 9051 25)

8a INTERNACIA TURISTA KONCENTRADO DE FERVOJISTOJ

AYWAILLE - REMOUCHAMPS (Belgio).

DE DIMANĈO la 9an ĝis SABATO la 15an de JUNIO 1968

Sub la Alta Patronado de "INTERNACIA FEDERACIO DE LA TURISTAJ FERVOJISTAJ ASOCIOJ" kaj kun ĝia kunlaborado.

Prezidantaro

Sra BERTRAND, Ministro de Trafiko de Belgujo.

Sro PIERS, Minstro - Ŝtatsekretario por Turismo.

Rabato por la Esperantistaj Fervojistaj Asocioj

150 BELGAJ FRANKOJ PO PARTOPRENANTO

Tiu rabato estas necesigita de la administraj elspezoj - Ĝi estos aŭtomate dekalkulita ĉe la pago al la Organiza Komitato.

PREZO DE LA PARTOPRENADO:

3250 BELGAJ FRANKOJ, ĉio enkalkulita T.E. de la vespermanĝo de dimanĉo la 9an ĝis la tagmanĝo de sabato la 15an de Junio.

- servmonoj kaj impostoj enkalkulitaj.

- unu trinkajo dum ĉiu manĝo.

- trinkmonoj - asekuro - vizitoj kaj ekskursoj per aŭtoĉaroj - veturoj per aŭtobusoj - akceptoj.

Partoprenado al la Granda Ferma Bankedo, vinoj enkalkulitaj.

Por programo kaj pliaj informoj: Dr P. Denoël, Rue V. Raskin 20 Liège.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056)216.54

VIRINAJ BLUZOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
por la eleganta sinjorino
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	:	Aalmoezenierstr. 2 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87 Leysstraat 10
Arlon	:	12 Marché-aux-Légumes
Brugge	:	Breidelstr. 8
Brussel	:	Anspachlaan 194 Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	:	Brabantdam 21
Herstal	:	4 Rue Large Voie
Leuven	:	Bondgenotenlaan 13
La Louvière	:	16 rue Albert 1er
Luxembourg	:	67 Place de la Gare
Mechelen	:	IJzeren Leen 32
Oostende	:	Kapelstraat 23
Roeselare	:	Ooststr. 124
Tournai	:	75 Rue Royale
Turnhout	:	Herentalsstr. 6
Verviers	:	2 Pont St. Laurent
Wetteren	:	Jos Buyssestr. 39-a